

Festivala Folio

BJELOVAR
2017
INTER-FEST
KROATIO

n-ro 1
sabato
la 5-an de aŭgusto
2017

KURIERO DE INTER-FEST



Franjo Forjan
prezidanto de la
Loka Festivala Komitato

ĜUU LA FESTIVALON!

Estimataj kaj karaj festivalanoj,

Antaŭ nur ses jaroj, la loka Esperanto-societo en Bjelovar refondiĝis kiel fenikso el la cindro de la antaŭa organizaĵo, post preskaŭ du jardekoj da stagnado. En 2011, kiam kelkaj individuaj esperantistoj ekhavis la ideon organizi la 9-an kongreson de kroataj esperantistoj en Bjelovar, ekzistis multaj skeptikuloj, kiuj esprimis siajn dubojn pri tiu ideo. Ili asertis, ke sen societo, ne eblas tion fari! Sed, la historio kiel vivinstruistino, ankoraŭfoje pruvis, ke ne ekzistas aferoj nerealigneblaj, se bolas entuziasmo kaj se oni kunigas la fortojn kaj ideojn.

La landa kongreso en 2011 estis modele organizita kaj senriproĉe aranĝita. Mi kuraĝus diri, ke ĝi trovis sian nekontesteban lokon en la enlanda Esperanto-historio.

Malĝustas la aserto de niaj samideanoj, ke neesperantistoj anticipe rifuzas kunlabori kun esperantistoj kaj ke Esperanto fariĝas nepopulara en la nuna mondo regata de la angla lingvo kaj kapitalismaj rilatoj. La esperantistoj de Bjelovar dum la pasintaj jaroj ĉiam havis perfektajn rilatojn kun la urbaj kaj departementaj strukturoj, kaj ricevadis subvenciojn kaj ĉiaspecan helpon por sia laboro. Tion plej trafe montras ankaŭ la subteno al nia nuna festivalo INTER-FEST.

Hodiaŭ, en la jaro de la 130-a datreveno de Esperanto kaj la 100-a mortodatreveno de Zamenhof, ni kolektiĝis en la gastama urbo Bjelovar, konfirmante, ke la Esperanta semo ĵetita ĉi tie en 1909 de Fran Kolar Krom, ankoraŭ vivas kaj donas abundajn fruktojn. Sen falsa modesteco mi arogas aserti, ke la Bjelovara Esperantista Societo nuntempe estas la plej aktiva Esperanto-organizaĵo en Kroatio.

En tiu ĉi agrabla momento mi volas saluti kaj bonvenigi vin, kiuj venis el diversaj urboj kaj landoj, fidante niajn kapablojn por organizi la nun komenciĝantan aranĝon.

Samtempe mi devas plenkore danki al la tuta Loka Festivala Komitato, kiu pene laboregis dum preskaŭ du jaroj, por ke ni povu ĝui la rezultojn de ilia laboro. Mi devas danki al ĉiuj konataj kaj nekonataj institucioj kaj individuoj, kiuj helpis al ni realigi nian revon, sed antaŭ ĉio mi dankas al vi – la festivalanoj, kiuj malgraŭ malfavoraj kondiĉoj kaj ĉiaspecaj danĝeroj de la nuntempa mondo, venis kun la granda espero renkonti en Bjelovar siajn samideanojn kaj omaĝi la grandulon Zamenhofon, kiun UNESKO listigis inter la gravaj personecoj de la homaro.

Mi volas resumi miajn nunajn dezirojn en unusola frazo: Ĝuu la festivalon kaj la gastamon de Bjelovar!

KELKAJ NEFORGESENDAJ FAKTOJ PRI INTER-FEST

INTER-FEST rezultis el multe pli frua ideo organizi en Kroatio la ILEI-konferencon. Tiun ideon lanĉis en februaro 2013 Josip Pleadin, kiu ricevis principan konsenton de la estraranoj de ILEI. Rezulte de tio, la 2-an de marto 2013 en Sisak estis subskribita Interkonsento de tri societoj, kiuj konsentis kune organizi la eventualan konferencon. Jam tiam, kiel potenciala konferencurbo estis elektita Bjelovar, kaj la intencletero estis transdonita al prezidantino de ILEI Mireille Grosjean dum la ILEI-konferenco, okazinta en Herzberg.

Por sproni la ideon, Bjelovara esperantista societo ricevis financon subtenon de 5.000 kunaoj de la Departemento por eldoni varb-reklamilon, disdonatan en la ILEI-konferenco en Motenvideo kaj la Universala Kongreso de Esperanto en Boanero.

Oficiala kandidatiĝpropono estis sendita al ILEI la 10-an de oktobro 2014, sed ĝi estis rifuzita kaj la organizado komisiita al Hungario. Ĉar la propono ŝajnis sufiĉe bone preparita kaj formulita, flanke de ILEI venis la propono, ke en Bjelovar samjare okazu kultura festivalo.

Samtempe Kroatio kandidatis por organizanto de Universala Kongreso de Esperanto, sed en la granda konkurenco, la ŝancoj de Kroatio estis tre malgrandaj. Do oni volis trovi anstataŭan aranĝon kun internacia karaktero. La proponita festivalo de ILEI estis bona okazo.

La 11-an de majo 2015 Bjelovaron vizitis Radojica Petrović, kiu donis la unuajn formuligojn pri la celoj kaj programoj de la festivalo, el kiuj multaj estis transprenitaj ankaŭ en la formuladon de la celoj de INTER-FEST. La planita festivalo estis nomita ILEI-FEST, oni tuj formis la organizan komitato, sed la afero haltis pro la nekongruenco de la opinioj kaj labormetodoj de ILEI kaj la lokaj organizantoj. La



*La forpasinta
vicprezidanto de
Loka Festivala
Komitato
Radenko Milošević*

lokaj organizantoj rezignis pri la kunlaboro kun ILEI kaj decidis mem organizi la festivalon, ŝanĝinte ĝian nomon al INTER-FEST (internacia festivalo).

La 5-an de marto 2016 estis formita Loka Festivala Komitato (LFK), konsistanta el 11 membroj. Unu el ĝiaj vicprezidantoj estis Radenko Milošević el Zagrebo, kiu forpasis en aŭgusto 2016, kaj la LFK kompletigis per 5 novaj membroj, estante fine 14-kapa.

La festivalan emblemon projektis neesperantisto, fama bjelovara dezajnisto Krešimir Ivanček, kiu plenumis ankaŭ multajn aliajn grafikajn laborojn por esperantistoj.

Ankoraŭ vi povas ...

... **ALIĜI AL INTERKONA VESPERO**, kiu okazos hodiaŭ je la 19h00 en la granda salono de la *Hotelo Central*. La abundega vespermanĝo kostas 100,00 kunaojn. Amuziĝu dancante laŭ la ritmoj de la ensemblo *Malnovaj amikoj* ĝis malfrua nokto.

... **HELPI NIAN SOLIDARECAN KASON** per aĉeto de la tombolo dum la Interkona vespero. La simbola prezo de 10,00 kunaoj garantias gajnon, ĉar ĉiu el la ricevotaj objektoj valoras multe pli.

... **ANTAŬMENDI KOMUNAN FOTON**, kiu estos grandformata kaj kara memoraĵo pri la Festivalo. La foto kostas 20,00 kunaojn kaj antaŭmendojn akceptas la festivala Akceptejo.

... **ALIĜI AL LA FESTIVALAJ EKSKURSOJ**. Bonvolu informiĝi pri la prezoj kaj disponeblaj lokoj ĉe la festivala Akceptejo.

... **ALIĜI AL LA DEKLAMKONKURSO**, kiu okazos la 7-an de aŭgusto je la 11h00 en la Altlernejo. Antaŭ ol aliĝi, konsideru, ke oni deklamas parkere!

RAPORTU PRI INTER-FEST!


La redakcio de *Festivala folio* petas ĉiujn festivalanojn raporti pri siaj impresoj dum partopreno de diversaj programeroj. Bonvolu verki mallongajn sed trafajn artikol(et)ojn kaj sendi ilin al la redakcio, prefere samtage kiam la raportita programo okazis. Se vi raportos pri la Festivalo en aliaj Esperantaj aŭ nacilingvaj periodaĵoj, bonvolu nepre informi nin pri tio, eventuale kun kopio de koncerna artikolo, aŭ kun mencio de la dato, numero kaj titolo de rezpektiva teksto.

esperanto.bjelovar@gmail.com

LA VORTAREGO DE JOZO MAREVIĆ



Nepre venu hodiaŭ je la 18h00 en la Malgrandan salonon de la Hotelo Central, kie okazos prezento de la *Oklingva medicina enciklopedia vortaro* (kiu enhavas ankaŭ Esperanton) de Jozo Marević. La aŭtoro mem partoprenos kaj parolos pri la aventuro rilate la eldonadon de la vortarego, kiu havas 3150 paĝojn kaj pezas 4,5 kilogramojn. Uzu ankaŭ la tre favoran festivalan prezon (50-procentan rabaton!), kaj vi havos la nuntempe plej ampleksan, plej pezan kaj plej multekostan libron vendatan en la libroservoj de Esperantujo!



Ne forgesu, ke ...

... hodiaŭ je la 16h00 ni malfermos du interesajn ekspoziciojn en la Urba muzeo de Bjelovar:

MIA UNUA ALFABETLIBRO – eksterordinaran ekspozicion de 120 alfabetlibroj el 42 landoj, ĉefe kolektitajn per helpo de esperantistoj! Ili prezentas sepdekon da lingvoj kaj multajn skribojn. Pri la ekspozicio aperis plenkolora katalogo kun trafa teksto de la lingvisto Nikola Rašić el Roterdam (iama Konstanta Kongresa Sekretario de la Universalaj Kongresoj de Esperanto) titolita *La plej grava libro en la mondo*.

LA FLUGILOJ DE FANTAZIO – ekspozicion de infanaj pentaraĵoj je libera temo. En la tri muzeaj salonoj estas prezentitaj ĉirkaŭ 270 pentaraĵoj el diversaj landoj, kolektitaj per helpo de esperantistoj. Dum la malferma ceremonio estos proklamitaj la rezultoj de la konkurso kaj la plej sukcesaj ricevos medalojn kaj diplomojn.



Fotis Berislav Rubčić

PUBLIKE

Ekde la komenco de la preparoj por INTER-FEST la regionaj ĵurnalistoj ofte publikigis informojn pri ĝi. Jen listo de kelkaj lastatempaj, pri kiuj ni scias:

Bjelovarski list n-ro 451 de la 10-a de julio publikigis la artikolon *U kolovozu u Bjelovar stižu gosti iz čitavog svijeta* (Aŭguste al Bjelovar venas gastoj el la tuta mondo).

Bjelovarac n-ro 3477 de la 13-a de julio publikigis la artikolon *Program će ove godine potrajati čak sedam dana* (La ĉi-jara programo daŭros eĉ sep tagojn).

La departementestro **Damir Bajs** la 27-an de julio organizis specialan ĵurnalistan konferencon pri INTER-FEST kaj poste la portalo de la Departemento Bjelovar-Bilogora publikigis grandan raporton sub la titolo *Društvo esperantista Bjelovar*

najavilo INTER-FEST (Bjelovara Esperantista Societo anoncis INTER-FEST-on).

En speciala 20-minuta elsendo *Gradske teme* (La urbaj temoj) de **Radio BBR**, sponsorita de **Urbo Bjelovar**, la 2-an de aŭgusto pri INTER-FEST parolis Franjo Forjan kaj Josip Pleadin. La elsendo estis ripetita la 3-an de aŭgusto.

Bjelovarac de la 3-a de aŭgusto publikigis la artikolon *Esperantisti u Bjelovar dovode goste iz cijelog svijeta* (La esperantistoj al Bjelovar venigas gastojn el la tuta mondo).

Bjelovarski list de la 31-a de julio publikigis la artikolon *Esperantisti u svoj Bjelovar dovode kolege iz cijeloga svijeta* (La esperantistoj al sia Bjelovaro venigas kolegojn el la tuta mondo).

LISTO DE ALIĜINTOJ

001. Françoise NOIREAU, Tauriac, Francio
002. Zlatoje MARTINOV, Beograd, Serbio
003. Georgi MIHALKOV, Sofio, Bulgario
004. Davor GRGAT, Split, Kroatio
005. Franjo FORJAN, Bjelovar, Kroatio
006. Josip PLEADIN, Đurđevac, Kroatio
007. Željko SAKS, Bjelovar, Kroatio
008. Marija JERKOVIĆ, Zagreb, Kroatio
009. Nikola PALATA, Bjelovar, Kroatio
010. Milivoj BORANIĆ, Zagreb, Kroatio
011. Martin BRÜGGEMEIER, Ahaus, Germanio
012. Martin FEJER, Veliko Trojstvo, Kroatio
013. Mikaelo BRONŠTEJN, Tiĥvin, Rusio
014. Ivanka MIHALJEVIĆ, Bjelovar, Kroatio
015. Damir MATAŠIN, Bjelovar, Kroatio
016. Tajana KUDUMIJA, Bjelovar, Kroatio
017. Ivana PLESKINA, Jurdani, Kroatio
018. Lidija LESKUR, Split, Kroatio
019. HO Song, Hanam, Korea Respubliko
020. Marie-Hélène DESERT, St. Avit, Francio
021. Senka MUSIN, Subotica, Serbio
022. Aranka LASLO, Subotica, Serbio
023. Vilmos TÓTH, Hungario
024. Mirjana SAKS, Bjelovar, Kroatio
025. Neven MRZLEČKI, Zagreb, Kroatio
026. Grozdana GRUBIŠIĆ-POPOVIĆ, Bjelovar, Kroatio
027. Małgosia KOMARNICKA, Lubin, Pollando
028. Inita TAMOŠIŪNIENĖ, Vilnius, Litovio
029. Vytautas TAMOŠIŪNAS, Vilnius, Litovio
030. Nenad MARGETIĆ, Bjelovar, Kroatio
031. Tomasz CHMIELIK, Świdnik, Pollando
032. Lidia LIGEZA, Kraków, Pollando
033. Grażyna PORADA, Kraków, Pollando
034. Augustyn KACZMARZ, Lublin, Pollando
035. Johan DERKS, Beograd, Serbio
036. André DAVID, Querrien, Francio
037. Zrnka MACAN, Bjelovar, Kroatio
038. Jasna PIŠČEVIĆ, Bjelovar, Kroatio
039. Zdenka POLAŠEK, Bjelovar, Kroatio
040. Berislav RUBČIĆ, Bjelovar, Kroatio
041. Ljiljana RUBČIĆ, Bjelovar, Kroatio
042. Ljerka STILINOVIĆ, Bjelovar, Kroatio
043. Vinko GRGUREV, Vodice, Kroatio
044. Slavica LOVRIN, Zagreb, Kroatio
045. Teodor MIKIĆ, Leprovica, Dugo Selo, Kroatio
046. Birthe LAPENNA, Kopenhago, Danio
047. Lech Jan MAZUREK, Niewodnica Kościelna, Pollando
048. Anna MAZUREK, Niewodnica Kościelna, Pollando
049. Katarzyna BRECZKO, Białystok, Pollando
050. Joanna GYKO, Białystok, Pollando
051. Vladimir PATAFTA, Bjelovar, Kroatio
052. Júlia SZALAINÉ TÍMAR, Budapest, Hungario
053. Sándor SZALAI, Budapest, Hungario
054. Mihaela CIK, Đurđevac, Kroatio
055. Andrea HORVAT, Đurđevac, Kroatio
056. Robert MILIJAŠ, Varaždin, Kroatio
057. Zdravko SELEŠ, Đurđevac, Kroatio
058. Jozo MAREVIĆ, Velika Gorica, Kroatio
059. Velimir PIŠKOREC, Zagreb, Kroatio
060. Roberto MAGLICA, Buje, Kroatio
061. Rémi CARON, Tremel, Francio
062. Nikola RAŠIĆ, Rotterdam, Nederlando
063. Ljiljana BAMBURAC, Rotterdam, Nederlando
064. Ivan RAŠIĆ, Rotterdam, Nederlando
065. Mirjana MAREVIĆ, Velika Gorica, Kroatio
066. Milica JEŽOVITA, Križevci, Kroatio
067. Josip JEŽOVITA, Križevci, Kroatio
068. Vida KAVUR, Bjelovar, Kroatio
069. Vlado JURKOVIĆ, Zagreb, Kroatio
070. Nijolė PETRAITYTĖ, Šiauliai, Litovio
071. Georgio WILHELM, Sentendre, Hungario
072. Anto MLINAR, Zagreb, Kroatio
073. Emile Nianga MALANDA, Cape Town, Sud-Afriko
074. Mirica SERETIN-ŠLAJS, Bjelovar, Kroatio
075. Anton MIHELIĆ, Čatež ob Savi, Slovenio
076. Reneja MIHELIĆ, Čatež ob Savi, Slovenio
077. Nika ROŽEJ, Kranj, Slovenio
078. Davorin JURAC, Prevalje, Slovenio
079. Zlatko HINŠT, Zagreb, Kroatio
080. Marijan BENC, Sesvete, Kroatio
081. Stjepan ŽARINA, Velika Gorica, Kroatio
082. Roža BRLETIĆ-VIŠNJIĆ, Zagreb, Kroatio
083. Blanka LASLO, Subotica, Serbio
084. Nikola GOLIĆ, Veliko Trojstvo, Kroatio
085. Monika Golić, Veliko Trojstvo, Kroatio
086. Sanja FORJAN PLESKINA, Jurdani, Kroatio
087. Mićo VRHOVAC, Banja Luka, Bosnio kaj Hercegovino
088. Jadranka FARSZKY, Vrbovec, Kroatio
089. Branko PLEADIN, Koprivnica, Kroatio
090. Dijana PLEADIN, Koprivnica, Kroatio
091. Nada PLEADIN, Đurđevac, Kroatio
092. Neven KOVAČIĆ, Zagreb, Kroatio
093. Željko GUBIJAN, Vrbovec, Kroatio
094. Natalija GUBIJAN, Vrbovec, Kroatio
095. Dea GUBIJAN, Vrbovec, Kroatio
096. Luka GUBIJAN, Vrbovec, Kroatio
097. Boris Arrate VERANES, Havana, Kubo
098. Spomenka ŠTIMEC, Hrašćina, Kroatio
099. Nevenka FRANK-GUŠTIN, Karlovac, Kroatio
100. Josip SODOMKA, Bjelovar, Kroatio
101. Josip ČIČEK, Bjelovar, Kroatio
102. Đurđa ČIČEK, Bjelovar, Kroatio
103. Zorka VUJOVIĆ, Bjelovar, Kroatio
104. Veljko VUJOVIĆ, Zagreb, Kroatio
105. Tea MACAN, Zagreb, Kroatio
106. Ivor MACAN, Zagreb, Kroatio
107. Ivan MACAN, Zagreb, Kroatio
108. Jovan NARANČIĆ, Grubišno Polje, Kroatio
109. Ivanka SELEŠ, Đurđevac, Kroatio
110. Goran LAKOTIĆ, Batina, Kroatio
111. Ivan LAKOTIĆ, Batina, Kroatio
112. Lovro-Marijan TRIŠIĆ, Zagreb, Kroatio
113. Božidar BREZINŠČAK BAGOLA, Hum na Sutli, Kroatio
114. László SZILVÁSI, Budapest, Hungario
115. Min Chen, Hefei, Ĉinio
116. Wei Deyi, Shengzhen, Ĉinio
117. Zhang Wen Rui, Hefei, Ĉinio
118. Xiao Xiulian, Shengzhen, Ĉinio
119. Gao Bo, Shengzhen, Ĉinio